Deklaro de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Tago de Homaj Rajtoj 2017

10-a de decembro 2017

Universala Esperanto-Asocio ree asertas la fundamentan gravecon de la principoj esprimitaj en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj precipe rilate al socia justeco kaj daŭripova evoluigo tutmonde.

Fondita en 1908, UEA – la ĉefa monda asocio por la uzado kaj disvastigo de la internacia lingvo Esperanto – dekomence laboris por la ideoj de homa egaleco kaj tutmonda interkompreniĝo. Kvardek jarojn poste, jam antaŭ la akcepto de la Deklaracio fare de Unuiĝintaj Nacioj, la Asocio enskribis respekton al la homaj rajtoj en sia Statuto kiel bazan kondiĉon por sia agado. Nuntempe ĝi aktivas por dissemi informojn pri homaj rajtoj en pli ol 120 landoj.

La jaro 2017 estas la centa jaro post la forpaso de D-ro Ludoviko Zamenhof, la iniciatinto de Esperanto, kiu dediĉis sian vivon al la interfratiĝo de la homaro. Hodiaŭ UEA substrekas la kongruon inter liaj klopodoj kaj la streboj por plene universaligi la homajn rajtojn. Zamenhof volis atingi mondon, en kiu “homo renkontiĝas kun homo” en rilatoj de plena reciproka respekto. Tio restas la fundamenta celo de UEA. La Asocio invitas ĉiujn defendantojn de la homaj rajtoj konsciiĝi pri la graveco de lingvaj rajtoj kaj lingva egaleco en la laboro por atingi pli justan kaj pacan mondon.

Statement of the Universal Esperanto Association on Human Rights Day 2017

On the occasion of Human Rights Day, **December 10, 2017**, the Universal Esperanto Association once again emphasizes the fundamental importance of the principles expressed in the Universal Declaration of Human Rights, particularly as they relate to social justice and worldwide sustainable development.

Founded in 1908, UEA – the principal world association for the use and dissemination of the international language Esperanto – has, from its beginning, worked for the ideas of human equality and worldwide understanding. Forty years after its founding, and before the official acceptance of the Universal Declaration by the United Nations, the Association included respect for human rights in its Constitution as a basic condition for its activities. Today it works to circulate information on human rights in over 120 countries.

The year 2017 marks the centennial of the passing of Dr. L.L. Zamenhof, the founder of Esperanto, who dedicated his life to the brotherhood and sisterhood of humankind. Today, UEA emphasizes the parallels between his work and the efforts to make respect for human rights truly universal. Zamenhof wanted to achieve a world in which “each individual meets with each individual” in a relationship of full and mutual respect. This remains the fundamental goal of UEA. The Association invites all defenders of human rights to increase their awareness of the importance of language rights and language equality in efforts to achieve a more just and more peaceful world.

Office of the Universal Esperanto Association at the United Nations
777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.
212-687-7041